

ĉeĥa	ukazatel změny koleje	itala	segnale quadro per il binario illegale
dana	signal for venstre spor	pola	wskaznik zmiany toru
germana	iam Gleiswechselanzeiger	rumana	indicator de circulație pe stânga
	nun	serba	signal promene koloseka
	Gegenfahrtauftragssignal		(obostrani saobraćaj)
franca	signal de contre-sens		
hungara	irányjelző	Esperanto	signalilo por ambaŭsenca trakutiligo
	(kétirányú közlekedésnél)		


Esperanto-terminproponoj:

- 1) signalo por kontraŭsenca trakuzo
- 2) signalilo por kontraŭsenca trakuzo

Por 08169-1 enestas nur la iama germana termino „*Falschfahrt-Auftragssignal*”. La nova estas „*Gegenfahrt-Ersatzsignal*”. Tio esprimas signalon.

Esperanto-terminproponoj:

- 1) substitu-signalilo por kontraŭsenca trakuzo
- 2) substitu-signalilo kontraŭsenctraka
- 3) substitu-signalilo kontraŭsenccvetura



Ĉefsignaliloj kun dekstraj komplementaj signaliloj

Fine mi sincere dankas pro la ĝisnunaj kontribuoj - anticipe pro novaj proponoj, kaj deziras agrablan kaj refreŝigan someron.

Heinz Hoffmann

Terminara Kuriero

TeKu 128

Julio 2006

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mci@t-online.de

UIC-kunlaboro daŭrigata!

Karaj geamikoj,

jen ĝojiga informo: Dum laborpaŭzo pro gravedeco de kolegino *Birgit Hoppe-Bellier* pli ol unu jaron sinjorino *Rosalinde Taucher* (:taŭĥer) okupas la laborlokon por evoluigi la datumbankon *RailLexic* de Internacia Fervojunio *UIC*. Jam okazis intensaj kaj esperigaj kontaktoj pri du aferoj:


Koncerne venontjaran IFEF-kongreson en Parizo, kolegino *Taucher* ĝentile akceptis nian prezidanton *Romano Bolognesi* kaj LKK-prezidantinon *Sylviane Lafargue* en sia buroo. Traktataj estis nia invito kaj la eblo, ke reprezentanto de *UIC* partoprenu nian 59-an IFEF-kongreson.

Koncerne terminologian laboron, *Rosalinde Taucher* kaj mi jam plurfoje rete korespondis kun tre bona rezulto. Ŝi volonte pretas enigi niajn tradukitajn difinojn kaj terminŝanĝojn en la datumbankon, por ke la eldonota CD-ROM-disketo *RailLexic 4.0* enhavu tion. Ŝi instrukciis min pri la enigmetodo per kodvorto. La unua prova sendo jam senprobleme sukcesis. Mi konfesas, ke dum lastaj jaroj mi iomete dubis, ĉu nia intensa plurjara laboro vere kaŭzos tian sukceson. Nun defalis ŝtono de mia brusto!

Pri la kongreso en Ŝanhajo

La surprizo de la unua IFEF-kongreso ekster Eŭropo estis ties normaleco. Tio rilatas kaj al organizado kaj al okazado kaj al partoprenintaro (neatendite pli ol 100 eŭropanoj, sed nur kelkaj japanoj). Granda parto de eŭropanoj (ne mi!) mirige regis manĝbastonetojn kiel ĉinoj sur la apuda desegnaĵo.

Koncerne preparojn, la kongreso apartenis al ĝis nun plej bonaj.



En la disdonitaj saketoj troviĝis multe da informa materialo, precipe faka. Ekster prelegaj kaj aliaj fakaj tekstoj, estis donita traktato pri ĉina terminologio de bazaj transportfakaj nocioj – laŭ mia lastjara peto (TeKu 127, paĝo 6). Mi studos tion kaj traktos interesajn specialaĵojn en TeKu 129. Tre admirinda estas la grandega kontribuo de jam 83-jara, sed nelacigebla ĈFEA-prezidanto *Li Sen*. Ĉe la inaŭguro li estigis „Honora membro de IFEF”.

Okazis tri fakaj kunsidoj. Partoprenis entute 33 gekolegoj, de ili 12 ĉinaj. Kolegoj *Li Sen* kaj *Ander Sen* deklaris estiĝi regulaj terminaraj kunlaborantoj, Kolegoj *Ludoviko Sekereš*, *Zdeněk Polák* kaj *Marc Noulin*, kiuj ne povis partopreni la kongreson, sendis leterojn kun siaj opinioj pri terminaj demandoj en TeKu 126 kaj 127. En la kongreso oni decidis jenajn terminojn:

- 01141-2 **regejo suborda trajntrafika**
 02386 **interesdeklaro pri livero**
 02562 **veturildeponejo**
 02641 **itinermalriglado**
 02835-0 **bremsadlongo**
 03858 **itineraranĝo**
 09217 **konstrumetodo Berlina (subtera trafikvojo)**
 12324 **kontenero kun radoj**

Laŭ la difinoj 00341 kaj 01819, la partoprenintoj preferis la terminojn „itinermalriglado komputila” kaj „itineraranĝo komputila”. Sed jen problemo: La nacilingvaj kaj ĝisnunaj Esperanto-terminoj estis enigitaj en la terminaron de *UIC* multajn jarojn antaŭ apliko de komputiloj en regejoj. Por eviti diferencon kompare kun naciaj esprimoj, necesas speciala trakto ĉe *UIC*, ĉu modifi la difinojn aŭ la naciajn terminojn.

Koncerne la nociojn 02835-1 kaj 11278, la partoprenintoj preferis la plej



kongresejo kaj hotelo *Er Yi* en Ŝanhajo

Kelkaj reviziaj taskoj

Por daŭrigi nian terminrevizion surbaze de tradukitaj difinoj – ĉi tie pri signaloj – ni komence interkonsentu, kiukaze uzi la vortojn „signaloj” kaj „signalilo”. Ja estas problemo, ke nacilingvoj pleje (?) ne distingas tiun diferencon.

Jen la PIV-klarigoj:

signaloj 1 Interkonsentita signo, uzata por komuniki de malproksime averton, ordonon, informon

signalilo Masto aŭ alia subportaĵo, ekipita per moveblaj brakoj (diskoj) kun lanternoj aŭ per diverskoloraj elektraĵoj por signali tage kaj nokte

Ekster la priskribitaj signaliloj ekzistas ankaŭ aliaj iloj por signali ĉe fervojo, nome

- a) fiksaĵoj, kiuj en ŝaltita stato donas unu lumsignalon, en malŝaltita stato neniun signalon,
- b) fikseblaj tabuloj ks, daŭre donantaj la saman bildsignalon,
- c) permanente moveblaj flagoj ks, por doni optikajn signalojn,
- d) aparatoj (fajfiloj ktp) por doni akustikajn signalojn,
- e) aparatoj por kondukisteja signalado.

Kaze de c), d) kaj e) la iloj havas proprajn nomojn, do ne necesas nomi ilin signaliloj. Kaze de b) la signaloj estas identaj kun la iloj. Sekve sufiĉas nomi ilin signaloj. Iom komplika estas la kazo a). Ekzemplon montras la komplementaj signal(il)oj ĉe ĉefsignalilo aŭ antaŭsignalilo, por informi pri aranĝita itinero, permesata rapido ktp. La adjektivo „komplementa” neniun diras pri la konkreta komuniko. Sekve se temas nur pri aparato povanta doni signalon, ni uzu la terminon „komplementa signalilo”. Sed se ekzemple temas pri direktindiko, respektive pri signata permeso preterpasi haltindikan ĉefsignalilon, ni tiukaze uzu la terminon „direktindika signalo”, respektive „substitu-signal”. Do tiuj ambaŭ signaloj estas komplementaj signaloj donataj per komplementa signalilo.

Nun al konkreta problemo:

08169-0 Signalo indikanta itineron al la najbara eksterstacia trako.

08169-1 Signalo ordonanta veturon dum haltindika elvetursignalilo al la kontraŭsenca eksterstacia trako.

Ambaŭkaze temas pri eksterstacie dutraka fervojlinio sur kiu en ĉiu direkto unu trako (laŭ konkreta lando, la dekstra aŭ maldekstra) estas regulsenca, la alia trako kontraŭsenca.

En la kazo 08169-0 sufiĉe moderna regejtekniko ebligas normalan itiner-rigladon kaj malferman pozicion de ĉefsignalilo ankaŭ al la kontraŭsenca trako. La komplementa signalo informas trakciilestron pri tiu escepta itinero.

En la kazo 08169-1 ekzistas nek normale riglebla itinero nek eblo de malferma pozicio de ĉefsignalilo al la kontraŭsenca trako. Esceptan preterpason permesas speciala substitu-signalilo indikanta ankaŭ uzon de kontraŭsenca trako.

Por 08169-0 *RailLexic* enhavas terminojn en ĉiuj lingvoj. Bonvole legu, ĉu en via lingvo la termino esprimas signalon aŭ signalilon aŭ estas tiukaze indiferenta. Se dominas la signalil-esprimo en la lingvoj, mi modifos la difinon al „Signalilo por indiki ...”.

koncizajn terminojn „bremsadistanco” kaj „bremsadistanco absoluta”. Tamen, laŭ skriba atentigo de *Ludoviko Sekereŝ* tiu esprimo gramatike malĝustas. Ja temas ne pri distanco de, el, per, por aŭ pri bremsado, sed pri distanco laŭ bremsadlongo. El la decido pri 02835-0 sekvas la solvoj:

02835-1 **bremsadlonga distanco**

11278 **bremsadlonga distanco absoluta**

Pri enkonduko de la ne-PIV-a neologismo „leno”, por solvi la ĝeneraltrafikan terminproblemon 02910 / 09817 (TeKu 127, paĝo 3), neniue konsentis. Aperis propono „pado” de kolego *Georges Meilhac*. Profesoro *Erich Dieter Krause* post denova demando volas uzi la neologismon „leno” laŭ Slipa Vortaro kaj Bildvortaro de *Rüdiger Eichholz*, unue por ŝoseparto (anstataŭ „koridoro” 3), due en aviado, trie por sporta konkursvojo – do ne por nia problemeto. Ankaŭ uzon de „pado” li ne subtenas. Mi substrekas, ke temas pri ĝeneraltrafikaj nocioj, ne speciale pri fervojfakaj, ŝosefakaj ktp. Ambaŭ nocioj koncernas nur trakton de trafikfluo, sendepende de konkreta trafiksystemo. Por denova diskutado mi pripensis du eblojn:

- aŭ „strio” (laŭ PIV: **strio 1** Longa, mallarĝa parto de surfaco, kun pli-malpli paralelaj randoj, distingiganta pro sia koloro aŭ heleco)

- aŭ „ŝpuro” (laŭ PIV: **ŝpuro 1** Distanco inter la internaj kapsurfacoj de ambaŭ paraj rulreloj de trako;

ŝpuro 2 Distanco inter la radoj de unu sama akso en veturilo)

El tio sekvas jenaj novaj proponoj:

02910 **1) veturvojo pare stria**

2) veturvojo pare ŝpura

09817 **1) veturvojo unustria**

2) veturvojo unuŝpura

Kion vi opinias?

Pri magnetvojaj terminoj

La travivaĵo veturi per magnetvojaj trajnoj en Ŝanhajo, kaj la kongresa prelego de kolego *Shi Xueqin* pri la magnetvojo en Ĉinio instigis min al denova pensado pri koncernaj terminoj. Kvankam magnetvojo laŭ PIV estas ne vera fervojo, se aparta transportsistemo, *UIC* antaŭ jaroj enigis multajn magnetvojajn nociojn en sian datumbankon. Tiam ni tradukis ĉiujn terminojn en Esperanton. Ankaŭ daŭrige ni konsideru magnetvojan terminologion kiel parton de nia laborkampo, ĉar ja ne ekzistas alia esperantista faka asocio ĉi-koncerna.

Ĉinaj kolegoj uzas en siaj tekstoj la vortojn „trajno”, „trako” kaj „vagono” ankaŭ por magnetvojo, kvankam la klarigoj en PIV iomete kontraŭas tion. Laŭ mia pripensado ni tamen akceptu la ĉinajn esprimojn. Ja en neniue alia lando ĝis nun publike funkcias magnetvojo. Kiel konsekvencon ni diskutu pri modifoj de PIV-difinoj, cele konservi la rezultojn por sekva PIV-revizio post pluraj jaroj.

- PIV: **trako 2** Konstruciaĵo, konsistanta el reloj, ŝpaloj kaj akcesoraĵoj, servanta kiel vojo kaj gvidilo por veturiloj

modifpropono: Konstruciaĵo por porti kaj gvidi veturilojn, ĉe fervojo kaj tramvojo konsistanta el reloj, ŝpaloj kaj akcesoraĵoj, ĉe aliaj transportsistemoj el analogaj elementoj

Per tiu modifo eblus uzi la vorton „trako” ankaŭ por magnetvojo kaj por unurelaj konstruciaĵoj de esceptaj metrooj, funikularoj ktp. La teksto sub la bildo sur paĝo 3 de TeKu 127 povus esti „unutraka magnetvojlino en Japanio”.

En niaj *RailLexic*-tradukoj koncerne tiun magnetvojan konstruciaĵon, ni uzis la vorton „(veturvoja) trabo”, ekzemple en „trabforko”, Tion mi korektus, se vi subtenas la proponon.



dum ekskurso en magnetvoja trajno - ĝis 431 km/h

- PIV: **vagono** Surrela veturilo, por transporti pasaĝerojn aŭ kargojn
- modifpropono: Vojgvida veturilo, por transporti pasaĝerojn aŭ kargojn
- PIV: **trajno 2** Vagonaro kun lokomotivo, motorvagonaro aŭ alia traktveturil(ar)o kun propra trakcio, entrafikigita sur unu aŭ pluraj fervojlinioj laŭplane aŭ laŭordone

modifpropono: ..., laŭplane aŭ laŭordone entrafikigita inter stacioj ^{du}

Via koncerna opinio estas bonvena.